

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

([KK]=nia kutima kunvenejo, nome Kanagawa-Kenmin-Sentaa, proksime de la Stacidomo Jokohama)

## Okazis

\*sept. 28, 29 [KK] Ekspozicio ĉe Foiro de Civitanaj Agadoj

Multaj grupoj, inkluzive nin, kunvenantaj en la KK ekspoziciis sian agadon.

\*okt. 5 [KK] Hama-Ronda Vespero

Ges-roj Kleemann el Germanio vizitis nin, kaj rakontis precipe pri la vojaĝo al Tanzanio, Afriko.

## Niaj Planoj


\*okt. 19 - nov. 23 [KK] Aŭtuna Kurso

3 horoj en tago, kaj entute 6 tagoj por enkonduko en Esperanton. Gvidos s-ro Fuse Kentaro. Kotizo estas 6 mil enoj (3 mil enoj por lernejanjoj).

~~\*nov. 10 (dim) [KK] Speciala prelego de s-ro Mikaelo Bronŝtein, kun temo (ankoraŭ ne fiksita)~~ **NULIGITA**

Mikaelo, naskita en Ukrainio kaj nun loĝanta en Rusio, parolos el la temo pri sia lando kaj kulturo.

\*dec. 8 (dim) [Civitana Kultura Halo en Urbo Ĉigasaki] La 49-a Zamenhof-Festo de la esperantaj grupoj en Gubernio Kanagawa



## Niaj klasoj kaj kursoj

Okazas jenaj klasoj (kutime en [KK])

\*Regulaj Klasoj en sabato

(1) Klaso "Eseoj", por legi "Tamen ĝi moviĝas!" gvidate de Doi Hirokaz

(2) Jokohama Salono. 2 fojojn monate oni legas (de aprilo) "La Ŝtona Urbo", originala romano de Anna Löwenstein, 1 fojon – libera verkado; kaj alian fojon – tradukado laŭ sia plaĉa fonto.

\*Regulaj Klasoj en merkredo

(1) Klaso "Belĉielo", por legi "Silento", tradukon de la japanlingva originalo, gvidate de Doi Ĉieko

(2) Klaso "eriko", por legi "Utila Estas Aliĝo", kaj poste "Kumeŭaŭa", gvidate de Doi Ĉieko

\*Neregula Klaso

(1) Klaso "Teksantoj", por legi "Kuniberto kaj Kilevamba", per la gvido de Doi Ĉieko, du fojojn monate.

## En elsendo de 3ZZZ

el "Novaĵoj Tamtamas n-ro 350, Aŭstralia Felix, fascina verko de Trevor Steele" de Aida Yayoi estis legita en la 23a de septembro.

## La 116-a Legokunsido

En la 14a de septembro ni havis la 116-an legokunsidon por "Vojaĝo de Onia" de Kim Onnuri (Onia). Partoprenis kvar personoj.

### Ĉarma raporto kun abunda ilustraĵo "Vojaĝo de Onia" de Kim Onnuri

Mizro Iwaya

Ĉarma kaj interesa - tiu ĉi libro estas ĝuste tia. La aŭtoro estas junulino, kiu komencis lerni Esperanton antaŭ ne-longe. Ŝi iris al Rejkjaviko en 2013, la 98a UK, kaj poste vojaĝis tra Eŭropo, sume ok landoj, 16 urboj, en 81 tagoj. Mi mem ŝatas vojaĝon kaj ofte partoprenas en UK, tial ŝia historio estis des pli interesa. Abunda ilustraĵo riĉigas la enhavon.

Mi vidas ke junulino havas avantaĝon. Ĉiu esperantisto bonvenigas ŝin. Do eble estis pli facile starigi itineron tiel longan. Komprenoble ĝi ne estis plata kaj kvieta vojaĝo, sed sufiĉe aventura. Aperis kelke da malfacilaĵoj, sed ŝia elano transsaltis ĉiun obstaklon. Brave!

Ŝi rekomendis kebabojn "Mustafa Demir's Gemüse Kebap" en Berlino(p.89). Laŭ ŝia rekomendo ankaŭ mi vizitis ĝin kiam mi estis en Berlino. Jes, ĝuste! Ĝi estas rekomendinda laŭ la gusto, prezo kaj kvanto, kvankam multaj gastoj faras longan vicon kaj atendigas min antaŭ la manĝejo.

Ŝi estis priŝtelita komence de la vojaĝo. Kia skandalo! Mi kredas ke ŝi estis sufiĉe deprimita pro tio. Sed ŝi tuj prenis rimedon kontraŭ tio. Do la tragedio fariĝis nur koloriga spico en la vojaĝo.

Ŝi partoprenis en la kurso de Greziljono. La enhavo de la kurso estas detale priskribita ĉi tie. Hum, interesa. Do mi eksciis ke ili kondukas kurson tiamaniere.

Aperas diversaj epizodoj dum la vojaĝo. Ankaŭ mi vojaĝis multe en la mondo kaj spertis multon. Do ŝia sperto sufiĉe konsentigas min. Jes, solvojaĝo estas tia.

La libro ne estas dika. Ĝi enhavas multe

da ilustraĵoj, komuna lingvo tra la mondo. Krome ŝi rakontas pri ŝia unika sperto. Do, la libro estas rekomendinda al ĉiuj esperantistoj: komencantoj kaj veteranoj.


### 81 tagoj da vojaĝo, sukcesa malgraŭ ĝenoj "Vojaĝo de Onia - Eŭropa"

Sibayama Zyun'iti

Jen temas pri libro 120-paĝa, sed kies foje eĉ du trionojn okupas skizoj fare de la aŭtorino Onia, korea esperantistino, do facile paĝumebla. Ŝi komencas sian itineron julie en Islando, kie okazis la 98-a Universala Kongreso, kaj migrante de eŭropa lando al lando por Esperantaj renkontiĝoj aŭ esperantistaj geamikoj. Aplaudon al la energio de junulino, kies unuafoja eksterlanda vojaĝo estis tiu ĉi. Dume, ne mankas, aŭ --- plenas --- ĝenaĵoj; komputilo ŝtelita jam en la unua lando Islando, dumvojaĝe ŝia valizo estis rompita ktp, ktp. Sed ŝin helpis kaj asistis multaj bonkoraj esperantistoj.

Mi mem, kun mia edzino, havis multajn ŝancojn viziti esperantistojn kaj Esperantajn aranĝojn alilande, kaj ne mankis ĝenaĵoj; ekzemple, ne-atingo de valizoj, kiuj devus flugi samtempe en nia aviadilo, sed ne estis en tiu aviadilo, ktp. Sed niaj ĝenaĵoj ŝajne ne estas tiel gravaj perdoj, kiujn Onia spertis.

Kaj estas signifplene, ke Korea Esperanto-Asocio entreprenis eldonon de tiu ĉi libro, kiu donas kuraĝon precipe al la juna generacio, ne nur korea. Mi aŭdis, ke Onia verkis la duan "Vojaĝo de Onia - Japano", en kiu ŝi partoprenis en diversaj Esperantaj aranĝoj en Japanio, vizitante nian landon plurfoje.



# La 104a Universala Kongreso en Lahtio

Mizro Iwaya

Lahtio estas malgranda urbo. La loĝantaro estas ĉirkaŭ 100 mil, kiu proksimume egalas al Ebina en Japanio. Do ankaŭ hoteloj ne estas multaj. Mia hotelo situis ĉirkaŭ 20 minutojn piede for de la kongresejo, trans unu monto. Lahtio estas norda urbo. Ĝia latitudo estas ĉirkaŭ 60 gradoj, sed la temperaturo estas sufiĉe alta en somero, kvankam ne tiel alta ol en Lisbono. Ĉi tie la marŝado dum 20 minutoj estis sufiĉe ŝvitiga.

La kongresejo, Isku Areena, estas originale konstruita kiel glacihokeejo, kiu havas grandan terenon da ludkampo ĉe sia mezo. Salono Zamenhof okupis mezan angulon de tiu ludkampo. Ĝin ĉirkaŭas spektoseĝoj, kaj ekster ĝia cirklo troviĝas diversaj ĉambroj kaj manĝetejoj. Tia konsisto estas eksterordinara se temas pri universala kongreso, sed baldaŭ ni trovis ke ĝi estas tre oportuna konsisto por nia uzo.

Grava okazaĵo en ĉi-jara UK estas ŝanĝiĝo de la prezidanto. Ĝis nun prof. Mark Fettes el Kanado okupis la lokon dum ses jaroj. Nova prezidanto de nun estas prof. Duncan Charters el Usono. Ŝajnas al mi ke li estas pli aĝa ol la ĝisnuna prezidanto, sed certe li volas plenumi la taskon akumulitan antaŭ li. Precipe financa problemo estas severa. Ni vidu lian decidon tiurilate.

La aliĝintoj estis malpli ol mil, relative malmultaj. Malgranda kongreso emas havi malriĉan programon. Tia tendenco ne estis rimarkinda, se temas pri oficialaj programeroj kiel malferma soleno, kleriga lundo, kongresa universitato, k.a. Sed se temas pri publikaj programeroj, ekzemple internacia arta vespero, la prezentantoj estis malmultaj. Mi ĉesu paroli pri la programo ĉar mi ne multe partoprenis en ĝi.

Laste mi montras novan estraron de UEA k.a.



skizo el Jokohamo

## Rugbea Mondfinalo en Jokohamo

Ĉi-jare de meze de septembro ĝis komence de novembro, en Japanio okazas la matĉoj de Rugbea Mondopokalo; entute 48 matĉoj en 12 matĉejoj. El ili, en Jokohamo okazas 7 matĉoj, inkluzive de la finalo en la 2a de novembro. La matĉejo estas la Internacia Stadiono de Jokohamo, alinome Nissan-stadiono. En la 13a de oktobro, tie Japanio venkis Skotlandon. Pri tiu stadiono estas skribite en nia eldonaĵo "Gvidlibro pri Jokohamo", lanĉita en 2017. Cetere en la urbo estas bonvenigaj ŝildoj ktp. Vidu la foton, nome statuon de rugbeisto, ĉe la distrikto Minato-Mirai.

(Sibayama Zyun'iti)



---

---

## Beletro

---

---

[De la redaktoro]

Ni prezentas al vi infanliteraturon japanan, tradukitan de bedaŭrata Koyama Takesi, nia membro. Li prezentis la tradukon en lernoklaso “Salono” en 2013, sed ne polurite lasis la verkon. La originala verkinto, Oota Hiroya estis infanliteraturisto (1917-2004). Ni aŭdis de Koyama, ke la traduko estis aprobita de la aŭtoro. Ni ne havas pruvon pri tio, sed kredas je tio, kaj aperigas la tradukon, iom polurinte la esperantan stilon.

### Rakonto pri 100 verkistoj — Leĝo de la urbeto Poriko —

Verkis OOTA Hiroya / Tradukis KOYAMA Takesi

(1)

Leginte tiun ĉi rakonton, se 10 legantoj opinias, ke ĝi estas bagatela aŭ seninteresa, kiamaniere la verkisto pardonpetu al ili? Se la legantoj ne estus 10, sed 100...

Ne, ni ne pensos pri tiel multaj verkistoj, sed nur pri 10 verkistoj. Estas iom hontinde por mi respondi. En ĉiu okazo rigardu la leĝon de la unua artikolo ĝis la tria en la urbeto Poriko.

(2)

En la urbeto Poriko, antaŭ longe, estis 100 homoj, kiuj verkis rakontojn. El ili, 25 homoj faris gajajn rakontojn, 25 verkis mizerajn, 25 verkis terurajn kaj plie 25 verkis absurdajn.

Tiuj 100 verkistoj ĉiutage verkis po unu, tial en la urbeto Poriko 100 rakontoj multiĝas ĉiutage kaj la loĝantoj en Poriko dronadis iom post iom en la rakontoj.

Ĉiutage ĉiutage legi kaj aŭskulti rakontojn po 100 fariĝis pli sufero ol plezuro por porikanoj.

“Ho ve, ni ne povas plu elteni tiom multe da rakontoj!” — tre rakontamaj porikanoj fine dolorkriis.

La hodiaŭa nova rakonto fariĝos malnova en la venonta tago, kaj se oni preterlegus ĝin, oni ne povus legi ĝin. Sed oni kredis, ke preteraŭdi eĉ unu el hodiaŭaj novaj rakontoj signifas iri paŝon malantaŭ aliaj, Tial oni devis tute aŭskulti hodiaŭajn rakontojn en la tago.

“Certe tio estas neeltenebla. Eĉ se mi aŭdas ilin, mi absolute ne povas memori rakonton!” — unu diris ĝemspire.

“Tamen oni ne bezonas memori la rakontojn” — alia respondis.

“Jes, vi pravas.” — aprobis la edzino de la urbestro en Poriko.

“Se mi jam memoris rakonton, ĝi fariĝas bagatelaĵo. La rakonto, kiu nature restas en kapo, estas tre bona.”

“Jes, certe!” — ĉiuj diris.

“Sed nenio restas en mia kapo.” — skuante la kapon unu persono murmuris malĝoje.

“Kion vi diras? Tio estas nepardonebla, ke nenio restas en la kapo, kvankam vi aŭskultis multe da rakontoj.” — la policano de la policejo Poriko diris kolere.

Surprizite unu demandis jene.

“Nepardonebla? Kio estas nepardonebla?”

“Ne, ne, tio estas mia kapo” — la policano gratis sian kapon honteme.

“Ne, nepardoneblaj estas la 100 homoj.” — diris la edzino de la urbestro.

“Nia kapo ne estas malbona, sed la rakontoj, kiujn tiuj homoj faris, estas malbonaj. Neniu el lastatempaj rakontoj entute restas en la kapo.”

(daŭrigota)

(originalo) 「100 人のお話作り屋 — ポリコの町の法律 —」 太田博也著

